

# VERDA Januaro 2012 **7** N-ro **7** TRIANGULO

bulteno por Esperanto-amikoj en Bretonio, Saksio kaj Silezio  
kazetenn mignoned an esperanteg e Breizh, Saks ha Silezia (br)  
bulletin pour les amis de l'espéranto de Bretagne, de Saxe et de Silésie (fr)  
Bulletin für Esperanto-Freunde in der Bretagne, Sachsen und Schlesien (de)  
bulletin za přečelow esperanta w Bretani, Sakskej a Śleskej (sb)  
biuletyn dla przyjaciół esperanta w Bretonii, Saksonii i na Śląsku (pl)



Kermaria-an-Iskuit (Bretonio)

## Enkonduko

Jen la sepa numero de nia ĉiujara bulteno – denova numero plena de legindaj kontribuoj, kiujn rete transsendis al mi Teresa Pomorska el Silezio kaj Bert Schumann el Bretonio – se ne la kontribuintoj mem. Miaj taskoj resumiĝas jene:

1. rete proponi gvidan temon – ĉi-foje: „**religiaj malkovroj**”
2. rete inviti kaj stimuli al verkado en la tri regionoj ĝis fiksita dato
3. atendi ke Teresa kaj Bert kolektu kaj transsendu la kontribuojn
4. kolekti kaj eventuale finpoluri ĉion ricevitan
5. transsendi la tuton al Steffen Eitner ([steffen.eitner@t-online.de](mailto:steffen.eitner@t-online.de)), kiu siavice prilaboros la numeron je du versioj: unu reta kaj unu papera.

La reta versio estos resendata kaj al Teresa, kiu dissendos ĝin en Silezio, kaj al Bert, kiu dissendos ĝin en Bretonio. La papera versio aperos almenaŭ en Saksio. Verdire tute ne estas herkula laboro kaj la rezulto valoras la penon – ĉu ne?

Sed nun komenciĝas nova jaro, kiam mia profesia situacio tiom radikale ŝanĝiĝos, ke mi devas rezigni plu zorgi pri nia bulteno. Tial mi proponas, ke se iu el vi estas preta transpreni miajn ĝisnunajn taskojn por nia bulteno, li/ŝi sciigu nin kaj senceremonie mem faru ekde somero 2012 tion, kion mi detalis ĉi-supre. Se vi havas intereson daŭrigi la ekzistadon de VERDA TRIANGULO, bonvolu do kontakti almenaŭ unu el la tri personoj: Teresa ([pomer@wp.pl](mailto:pomer@wp.pl)), Bert ([bert.schumann@gmail.com](mailto:bert.schumann@gmail.com)), Benoît ([abu-sina@arcor.de](mailto:abu-sina@arcor.de)).

Agrablan legadon kaj plej prosperan jaron 2012 deziras al vi Benoît Philippe (Pillnitzer Landstraße 25, DE-01326 Dresden).

**Amikoj**

Leporo gaja, juna,  
 Profitis tagon sunan,  
 Manĝis herbon, floretojn kampe kaj ĝardene,  
 Kun ĉiuj serene.  
 Ĉar li estis afabla, gaja, akurata,  
 Estis de bestoj tre ŝatata.  
 Kaj li ankaŭ uzante la vivon piknike  
 Kun ĉiuj vivis amike.  
 Foje kiam li ĝoje tra herbej' kuris,  
 Voĉoj lin teruris:  
 Timigaj hundbojadoj, knaro traarbara.  
 Haltis li - aŭskultis la voĉon bizaran.  
 Kaj kiam pli proksime bru' severa muĝis,  
 Lepor' fuĝis.  
 Rerigardas li: hundar' de ĉasist' pelata!  
 Timigata,  
 Almenaŭ trovis vojon, kaj trompis hundaron.  
 Ĉevalon li renkontis, petas solidaron:  
 "Prenu min dorsen, forrajdu!" - La ĉeval' rifuzis :  
 „Alies helpo vi povas ekuzi».  
 Bovo tuj prezentiĝis. - „Savu min kolego !»  
 Bov' diris: „Al mi similan alian bovegion  
 Vi ne trovos, sed atendu en herb' vin kaŝante.  
 Bovino min atendas», diris li forirante  
 «Kaj nun kapr' proksimiĝas, helpo vin sen skrupulo».  
 La kapr': „Mia povrulo,  
 Mi ne portos vin dorso: dors' tro dura ĝenas.  
 Jen lanoplana ŝafo proksime promenas,  
 Mole vi sidas rajde..." La ŝafo miaŭas:  
 „Mi ne kontraŭas,  
 Sed eĉ se trompovoje mi vin forrajdigos,  
 Hundoj kaptos nin ambaŭ kaj poste mortigos;  
 Al najbare manĝanta bovido vi venu".  
 „Kial mi dorsen vin pren, u,  
 Kiam plenaĝaj rifuzis?" bovid' ekmurmuris  
 Kaj forkuris.  
 Pluajn savorimedojn oni ne aranĝis,  
 Leporon inter amikoj ĉashundoj formanĝis.

*Ignacy Krasicki (1735 – 1801)*

El la pola lingvo esperantigis *Andrzej Kraszewski (Wrocław – Silezio)*

Originala titolo : *Przyjaciele*

**Ni**

ni aĵojn  
 ne rigardas pupilen  
 ilin lucide  
 ni ne eltenus

ni povas palavri  
 pri ovoj kaj bovoj  
 povas legodroni  
 pri herooj kaj ĥimeroj  
 povas distre ĵazi  
 aŭ persisti en alia fars'  
 estas ja tiom da rimedoj  
 narkoti sin ĝis sat'

ni povas ludi  
 milon da frenezaĵoj  
 por ne freneziĝi  
 povas imagi dum jardekoj  
 ke ĉio restos  
 kia ni ĉion imagis

ni aĵojn  
 ne rigardas pupilen  
 ili devigus nin  
 vertiĝi genuiĝi  
 la manotordado  
 la ploro  
 la krio

*Benoît Philippe (Saksio)*

**Unu el la plej gravaj artikoloj el la jaro 2011:  
Impresoj pri la 96-a Universala Kongreso**

**Enkonduko**

Kvankam mi esperantistiĝis jam en 1986, t.e. unu jaron antaŭ la centjariĝo de Esperanto, mi ne havis okazon partopreni en la Universala Kongreso ĝis 2009. Ĉar somere mi ofte partoprenas en internaciaj konferencoj pri la hebrea kaj la jida, pri kiuj mi okupiĝas profesie, mi devis havi tre specialan kialon por partopreni en la UK, kaj la fakto, ke ĝi okazis en Bjalistoko, finfine decidigis min „gustumi“ tiun ĉi unikan kongreson.

En mia unua UK, en la naskiĝurbo de Zamenhof, ĉio estis nova kaj freŝa por mi, kaj mi tre ĝojis konatiĝi persone kun dekoj da famaj esperantistoj, pri kiuj mi aŭdis kaj/aŭ kies verkojn mi legis, ĉefe danke al tio, ke mi faris kelkajn prelegojn dum la kongreso. Tiu ĉi unua UK estis kaj restas por mi neforgesebla travivaĵo, kaj mi estas tre kontenta, ke mi fariĝis kaj restas esperantisto. Ankaŭ la fakto, ke ĝi havis judan „guston“, plaĉis al mi.

Ĉi-jare, du jarojn post Bjalistoko, mi denove partoprenis en la UK, kiu okazis en Kopenhago. En multaj kampoj de la vivo oni emas kompari sekvantajn travivaĵojn de la sama speco kun la unua, kaj ofte la sekvantaj spertoj diferencas (ofte seniluziige) de la unua. Simile, la Universalan Kongreson en Kopenhago mi ne povis ne kompari kun tiu en Bjalistoko. Mi sentis kaj pensis sufiĉe alie kaj rimarkis tiujn aferojn, kiujn mi ne rimarkis pasintfoje, pri la tutmonda Esperanto-komunumo ĝenerale

kaj pri la UK speciale, t.e., mi trovis vole-nevole, ke ne ĉio estas „rozkolora“.

La tri plej fortaj impresoj pri mia dua UK, kiujn mi havis dum kaj/aŭ post mia restado en Kopenhago, estas konatiĝo kun aliaj kongresanoj dum la UK, internacia komunikado kun komuna lingvo sed sen komuna kulturo, kaj la fenomeno de krokodilado eĉ dum la UK.

**Konatiĝo kun aliaj kongresanoj dum la UK**

Mi ne estas homo kiu facile „vendas“ sin en kunvenoj, kie li konas neniun alian, prezentante kaj reklamante sin al nekonatuloj. Prelegi helpas min konatiĝi kun aliaj partoprenantoj en kongresoj, ĉar post mia prelego almenaŭ kelkaj el ili alproksimiĝas por paroli kun mi. Tiamaniere mi sufiĉe longe interparolis kun multaj partoprenantoj en la UK en Bjalistoko. Kvankam same kiel en Bjalistoko ankaŭ ĉi-foje mi prelegis en IKU-AIS, mi parolis kun malpli da kongresanoj kaj dum malpli da tempo, kaj mi ne havis okazon paroli kun eĉ unu loka, t.e. dana partoprenanto!

Mi demandis kaj demandadas min, kion faras tiuj, kiuj ĉeestas en la UK la unuan fojon, konas neniun alian, kaj ne prelegas. Kiamaniere ili iniciatas konversaciojn kun alilandaj kongresanoj? Por tio ili venis speciale al la kongreso! Mi vidis sufiĉe multajn, kiuj verŝajne partoprenis en la UK la unuan fojon, kaj ĉiam restis solaj en la kongresejo. La „interkona vespero“ kaj la kunveno por unuafaj kongresanoj certe ne sufiĉas por ili! Devas esti ankaŭ aliaj solvoj por helpi novajn kongresanojn interkonatiĝi.

**Internacia komunikado kun komuna lingvo sed sen komuna kulturo**

Eĉ post kiam vi finfine konatiĝas kun alilandaj kongresanoj, atendas vin alia, pli grava problemo, pri kiu ne sufiĉe multaj esperantistoj konscias – internacia komunikado kun komuna lingvo sed sen komuna kulturo. Ĉi-foje mi alvenis al firma konkludo, ke komuna lingvo sola ne estas sufiĉa por signifohava kaj interesa dialogo preter la nivelo de supraĵa konversacio. Oni devas havi ankaŭ komunan kulturon, aŭ oni devas almenaŭ koni la kulturon de la persono, kun kiu oni interparolas.

Per „kulturo“ mi intencas precipe pragmatikon, t.e. kiel oni uzas lingvon. Ekzemple, diversaj kulturoj havas diversajn kaj ofte tute malsimilajn strategiojn por peti pardonon (aŭ eĉ por eviti pardonpeton), humuro diferencas de kulturo al kulturo, kaj tiel plu.

Mi ne konstatas, kompreneble, ke mia juda pragmatiko konstante demandi (ofte retorike kaj ironie) kaj ŝerci spontane estas la plej bona, tamen mi ne ŝanĝas ĝin eĉ kiam mi interparolas kun iu el alia kulturo en alia lando. Mi devas konfesi, ke estis por mi malfacile kaj eĉ frustre prelegi publike kaj interparoli persone kun personoj, kiuj ne havas pli-malpli saman pragmatikon kiel mia.

Mi eĉ trovis, ke kvankam mi interesiĝas pri aliaj kulturoj, mi ĝenerale ne povas ĝui dialogon kun alikulturanoj en iu ajn lingvo, inkluzive de Esperanto, kiel kun judoj, kiuj konas la judan kulturon aŭ almenaŭ konscias pri ĝi, en la hebrea, la jida aŭ la juda angla.

Tiu ĉi nova eltrovo neeviteble kondukis min al la „danĝera“

demando, kial do mi devas resti esperantisto kaj partoprenadi en la UK. Mi certe plu partoprenos, eĉ se ne ĉiun jaron, por konatigi aliajn kongresanojn kun aspektoj de la tradicia juda kulturo, kiun mi tre amas, speciale vidinte, ke multaj el ili interesiĝas pri tiu ĉi kulturo kaj eĉ admiras ĝin.

**La fenomeno de krokodilado eĉ dum la UK**

Kiam mi ankoraŭ loĝis en Japanio, mi provis partopreni en lokaj Esperanto-kunvenoj, tamen mi preskaŭ ĉiam seniluziĝis, ĉar multaj homoj krokodilis en la japana pli ofte ol parolis en Esperanto! Mi devis ripeti konstante, ke **se esperantistoj ne parolos Esperanton, neniu parolos ĝin**, sed mi timas, ke tia peto ne plaĉis al ili. Do kiam mi vidis dum la Universalaj Kongresoj en Bjalistoko kaj Kopenhago multajn japanajn kongresanojn, kiuj krokodilis en la japana, tio nek estis novaĵo por mi nek ŝokis min. Tamen mi surpriziĝis vidi ankaŭ alianaciajn kongresanojn, kaj en Bjalistoko kaj en Kopenhago, kiuj restis en naciaj grupoj kaj parolis la nacian lingvon. Mi ne povas kompreni ilian motivon pagi grandan sumon da mono por veturado al la kongreslando kaj restado en la kongresurbo, sed ĉiam resti kun la samlandanoj kaj konstante krokodili en la kongresejo.

Ĉi-rilate ni, israelaj esperantistoj, povas fieri, ke ni malofte krokodilas, ne nur dum la UK sed ankaŭ en Israelo, eĉ kiam ne troviĝas alilandaj esperantistoj inter ni. Tiu ĉi diferenco devenas verŝajne de la diferenco en la koncepto pri la rilato inter lingvo kaj nacieco. Por certaj nacioj iliaj nacia lingvo kaj nacieco


estas neapartigeble ligitaj unu kun la alia, tiel ke ili havas psikologian obstaklon por paroli kun siaj samlandanoj en alia lingvo, tamen tiuj, kiuj ne uzas Esperanton en sia lando, ne povas ekuzi ĝin subite dum la UK. Por ni israelanoj (kaj judoj) ne ekzistas tia neapartigebla ligo inter lingvo kaj nacieco, ĉar ni havas diversajn denaskajn lingvojn.

### Konkludo

Kiam oni skribas pri siaj impresoj pri la UK, oni ofte emas skribi nur pri pozitivaj aferoj, laŭdante ĝin. En tiu ĉi artikolo mi pritraktis tri ne tiel pozitivajn aspektojn de la tutmonda Esperanto-komunumo

ĝenerale kaj pri la UK speciale, ĉefe ĉar oni ne ĉiam konscias pri ili kaj ne pensas objektive pri ili kaj iliaj kialoj. Tamen tiuj, kiuj pensus, ke mi nur grumblas, tute erarus. La tutmonda Esperanto-komunumo kaj la UK ne ĉie estas „rozkoloraj“, sed ju pli da spertoj pri ili mi akumulas, des pli forte mi (ad)miras tiujn unikajn komunumon kaj kongreson. Mi eĉ dirus, ke tiuj, kiuj ankoraŭ ne travivis ilin, ne scias, kion ili perdas. Vortoj (miaj) ne sufiĉas por esprimi ilian unikecon.

*Tsvi Sadan (Tsuguya Sasaki)*  
(aperinta en ESPERANTO,  
novembro 2011, paĝoj 225-226)



### Vizitu

[www.gresillon.org](http://www.gresillon.org)  
[www.lernu.net](http://www.lernu.net)  
[www.eventoj.hu](http://www.eventoj.hu)  
[www.podkasto.net](http://www.podkasto.net)  
[www.esperanto.de](http://www.esperanto.de)  
[www.edukado.net](http://www.edukado.net)  
[www.uea.org](http://www.uea.org)  
[www.eventeo.net](http://www.eventeo.net)

[www.esperanto.bretonio.free.fr](http://www.esperanto.bretonio.free.fr)  
[www.esperanto-dresden.de](http://www.esperanto-dresden.de)  
[www.eo.wikipedia.org](http://www.eo.wikipedia.org)  
[www.liberafolio.org](http://www.liberafolio.org)  
[www.vroclavo.republika.pl](http://www.vroclavo.republika.pl)  
[www.esperanto.net](http://www.esperanto.net)  
[www.esperantoland.de](http://www.esperantoland.de)  
[www.esperanto-panorama.net](http://www.esperanto-panorama.net)

### Fluo

Kiam silente, ofte la Kreo  
Ŝajnas al mi senborda fluejo.  
Fluas la mondo, fluas mi mem kaj  
en tiu fluo ondas ideo.

Kune kun ventoj, nuboj, riveroj  
fluas la sentoj, duboj, esperoj!  
Fluas la plej interna sentfluo  
kun la eterna fluo de l' Sferoj.

Vojo kaj celo, maro kaj bordo,  
nasko kaj morto, sudo kaj nordo,  
ĉio kuniĝas, ĉio kunfluas  
en korvibriga kosma konkordo.

*Leen Deij (1919-2011)*

## Preĝejoj de la Paco

En Malsupra Silezio ekzistas du Preĝejoj de la Paco (germane *Friedenskirchen*): en Świdnica (germane *Schweidnitz*), kaj en Jawor (germane *Jauer*). Tria preĝejo - en Głogów (germane *Glogau*) estis malbonsanca - unue ĝi kolapsis, rekonstruita kaj finkonstruita - forbrulis pro fulmotrafo.



Jawor

Tiuj ĉi preĝejoj estis konstruitaj en la dua duono de la 17-a jarcento rezulte de la Vestfalia Packonsento finanta la Tridekjaran Militon (1618-1648). Tiam la katolika imperiestro Ferdinando la Dua, multe instigita de protestanta Svedio, konsentis permesi al la Luteraoj de Malsupra Silezio konstrui tri preĝejojn. La permeso enhavis ankaŭ kelkajn limigojn, kiuj nuntempe povas ŝajni strangaj:

1. la preĝejoj estu konstruotaj sole el malfirmaj materialoj - ligno, pajlo, sablo, argilo - sen uzo de metalaj elementoj;
2. la preĝejoj estu konstruotaj ekster la urbaj muroj en distanco ne pli granda ol kanona pafo;
3. la preĝejoj ne havu turojn, sonorilojn kaj ne aspektu kiel preĝejo;
4. ili konstruiĝu en daŭro de unu jaro;
5. ili konstruiĝu je la kosto de protestantoj;
6. ĉe la preĝejo ne estiĝu paroĥaj lernejoj.

Mi vizitis antaŭ dekkelkaj jaroj la preĝejon en Świdnica. Sed ĝuste tiam estis tie okazanta solena diservo kaj kompreneble ajna irado, pririgardado kaj fotado ne eblis.

En la preĝejo en Jawor mi estis en la jaro 2010. La preĝejo estis konstruita en la jaroj 1654-1655 laŭ projekto de *Albrecht von Säbisch*.

De-ekstere ĝi aspektas kiel granda garbejo. Dikaj traboj vertikalaj, horizontalaj kaj oblikvaj, ligitaj per lignaj stiftoj. Spacoj inter la traboj estas blankaj. La konstruaĵo estas granda, sed ne impona, dum oni estas ekstere. Oni devas eniri la internon kaj tiam oni sentas ŝokon! Grandega halo kun kelkaj etaĝoj de balkonoj. Ĉio kovrita per skulpturoj, ĉio bunte pentrita. Parto de la benkoj estas origina, pli ol 300-jara, kvankam nun iom ŝovita malantaŭen pro eluziteco. Belega altaro, ambono, orgeno...

Oni devas ĝin vidi. Eĉ se mi plej detale ĉion priskribus - la priskribo ne donus la veran aspekton kaj belecon de la preĝejo.

Mi aldonas kelkajn fotojn, kiujn mi faris dum la ekskurso - ili almenaŭ iom montru, kion oni tie povas vidi.

Nur mallonge ankoraŭ pri la preĝejo en Świdnica. De-ekstere ĝi malmulte diferencas de tiu en Jawor. Tamen la interno estas alikonstrua - ĝi formas egalmezuran krucon.

Kiu povas - nepre vizitu tiun aŭ la alian preĝejon. Kaj plej bone - ambaŭ. Jawor kaj Świdnica distancas sufiĉe malmulte - la distanco ne estas pli granda ol 50 kilometrojn.

*Teodor Konopka (Wrocław – Silezio)*

## Sankta Elegio (Saint Éloi)

Sankta Elegio estas unu el la plej kultitaj kristanaj sanktuloj en Eŭropo. Li estas ankaŭ konata de ĉiuj francaj infanoj per la kanzono "La reĝo Dagoberto". Fakte tiu kanzono ne estis farita por infanoj, ĝi aperis fine de la 18-a jarcento, por kaŝe moki la reĝon Ludovikon la Deksesan uzante la nomon de la tiam nekonata mezepoka reĝo Dagoberto :

"La reĝo Dagobert'  
Metis la kuloton 'invers'.  
Elegi' la sanktul'  
Per moka formul'  
Diris : "Reĝa moŝt',  
Misas la kulot'."  
"Prave, diris la reĝ',  
Ĝin mi tuj remetos laŭleĝ."

Laŭ la tempo, pluraj strofoj estis aldonataj, el kiuj kelkaj por moki Napoleonon, kaj nuntempe la kanzono enhavas 22 strofojn.

Sankta Elegio estas unu el la tre malmultaj kristanaj sanktuloj festitaj po du fojojn jare, la 21-an de Junio kaj la unuan de Decembro. Oni preĝas al li por resanigi okulojn aŭ ĉekrurajn vundojn. En Eŭropo multaj preĝejoj, fontoj, eĉ stratoj kaj vilaĝoj estas dediĉitaj al Sankta Elegio, ĉefe en Francio kaj Belgio. Sed ankaŭ en Kebekio, iu vilaĝo, ĉe la rivero *Saint-Laurent*, nomiĝas *Saint-Éloi*. Multaj metioj elektis lin kiel patronon : unuflanke, la metioj kiuj rilatas al metalo : juvelistoj, hufoforgistoj, mekanikistoj ktp., aliflanke la metioj kiuj rilatas al ĉevaloj : plugistoj, farmistoj, kaleŝistoj (nun taksistoj) ktp. Poste, vi malkovros kial.

Sankta Elegio naskiĝis en la jaro 588 en la vilaĝo *Chaptelat*, 8



kilometrojn for de la urbo Limoĝo (france *Limoges*, okcitane *Limòtges*) en Akvitanujo. Lia patro instruas lin pri metalarto kaj konfidas lin al la reĝa juvelisto de Limoĝo. La junulo riveligis rapide tre lerta kaj, post kelkaj jaroj, laboras ĉe la reĝa trezoristo en Parizo. Li faris por la reĝo Klotaro la Dua du tiel belegajn seĝojn el oro kaj gemoj, ke la reĝo elektas lin kiel personan konsiliston. Elegio faras pli kaj pli belajn juvelajn artaĵojn (krucojn, relikvujojn, ktp.) kaj lia famo rapide kreskas en Eŭropo. La posta reĝo, Dagoberto la Unua, nomumas lin trezoristo kaj tiam Elegio estras la mon-atelieron de la reĝlando. Li efektivigas gravan monreformon, reorganizas la moncirkuladon favore al la reĝo, kaj ebligas pacotraktaton kun la bretona reĝo Judikaelo, kiu senĉese minacis la okcidentan landlimon de la naskiĝanta Francujo.

Ĉar li estas fervora katoliko, li uzas sian influon sur la reĝon, por havi la necesan monon por helpi al malriĉuloj kaj liberigi sklavojn saksajn, britajn, gaŭlajn ktp. Laŭdire, li vivas tre pie kaj humile, kaj disdonas ĉiujn siajn posedaĵojn al malriĉuloj, eĉ siajn luksajn vestaĵojn. Li konstruigas faman monaĥejon en *Solignac* apud Limoĝo, monaĥinejon en Parizo, kiu kunigos ĝis 300 virinojn el ĉiuj sociaj rangoj (sklavinojn kaj nobelinojn), kaj bazilikon dediĉitan al Sankta Paŭlo.

La 13-an de Majo 639 li estas konsekrita en la katedralo de Rueno (france *Rouen*) episkopo de *Noyon* kaj *Tournai*, unu el la plej vastaj diocezoj de la reĝlando. Li akre batalas kontraŭ la tiamaj paganaj kredoj kaj kutimoj, multe vojaĝas por konverti flandrojn kaj frisojn, kaj konstruigas multajn monaĥejojn. En siaj predikoj li vigle skurĝas pekojn, kiujn li konsideras plej gravaj: adulton, avarecon, koleron kaj... drinkadon. La 22-an de Junio 654, li subskribas kun la tiama reĝo Klovis la Dua la edikton pri la privilegio atribuita al la abatejo en *Saint-Denis*, tiam apud Parizo. (Tio estas la ununura aŭtentika dokumento skribita de Sankta Elegio mem, konservita en la muzeo Luvro).

Lia biografo kaj samtempulo, Sankta *Ouen* (609 – 686), raportas pri la multaj mirakloj, kiujn li laŭdire plenumis (aŭ kiuj estas atribuitaj al Elegio): per nura preĝo li liberigis kaptitojn, resanigis blindulojn, surdulojn, paralizulojn, homojn kovritajn je ulceroj, kriplulojn, ktp. Ankaŭ post sia morto, la unuan de Decembro 659, li plenumas

miraklojn. Ekzemple, kelkajn tagojn post lia morto, ĵus antaŭ la entombigo, la reĝino malfermigis la ĉerkon, por kisi lastfoje la sanktulon sur la frunto; tiam ŝprucis el liaj naztruoj sangofluo, kiu makulis la vestaĵojn de la reĝino kaj de la ĉeestantaj episkopoj. La postan jaron, kiam oni metis lian korpon en pli dignan tombon en la preĝejo de *Noyon*, oni konstatis ke la korpo ne difektiĝis, kaj eĉ ke la barbo kaj la haroj kreskis!

Sed la plej konata legendo pri Sankta Elegio estas jena: iam la sanktulo volis hufferi calcitrantan ĉevalon. Por faciligi al si la taskon, li fortranĉis la kruron, metis ĝin sur amboson, trankvile fiksas la hufferon, kaj relokis la kruron. Tiel li inventis facilan teknikon, por hufferi iun ajn ĉevalon! Bildo pri la legendo videblas en vitralo de la preĝejo Sankta Kruco en Lieĝo. Ekzistas pluraj versioj de tiu legendo.

Multaj ritoj kaj festoj okazis, anko raŭ antaŭ kelkaj jaroj, honore al Sankta Elegio: en Flandrio, en Provenco en Junio (ekzemple en la vilaĝoj *Mollèges* kaj *Garlaban*; en Bretonio okazis, favore al la bona sano de ĉevaloj, procesioj apud kapeloj kaj fontoj dediĉitaj al Sankta Elegio; en *Paimpont* (bretona vilaĝo en samnoma arbaro) kun fama forĝejo, oni festis lin la unuan de Decembro. La kompatinda Sankta Elegio estas tiel konata kaj populara, ke oni nomis eĉ konfitaĵon "Sankta Elegio" (mi havas la recepton!), kaj ke eblas trovi lin eĉ en trivialaj soldataj francaj kanzonoj (ekzemple: "La tri juvelistoj")!

*Jean-Pierre Ducloyer*  
(Montfort/Monforzh - Bretonio)

### Post la Morto reas la Vivo Post la Avo reas l' Infano Post silento reas Esperanto

Mi surpriziĝis pri la enkonduko de la 5-a numero de nia bulteno.

Certe la Morto, nomata „*l'Ankou* „ en Bretonio, tage-nokte falĉas la Vivon, sed ĝis nun, Li ne sukcesis falĉi Esperanton.

La Morto estas familiara temo de la kelta penso kaj akompanis niajn praavojn laŭlonge de la vivo. En Bretonio, kiam aŭdiĝis la knara ĉareto, ĉiuj timas la akran falĉilon.

Ĉu por ekzorci tiun malfavoran sorton estis starigita la kapelo *Kermaria-an-Iskuit*?

Tiu kapelo situas en la komunumo *Plouha*, en la regiono *Goëlo* (bretone *Gouelou*) norde de Bretonio. Ĝi staras en malgranda vilaĝo: *Kermaria*, je kelkaj leŭgoj de la marbordo. Impon-mezura monumento, ĝi estis fondita je la 13-a jarcento de *Henri d'Avaugour* kaj aliaj senjoroj el la regiono, kiuj revenis bonsanaj de la Sankta Tero post la krucmilito. Ĝi estis dediĉita al "Itron *Varia An Iskuit*" (Sinjorino Maria kiu protektas, defendas...)

Oni distingas tri konstru-epokojn:  
- La unua (13-a jarcento) konsistis nur el la kvar unuaj spanoj de la navo kaj la lateroj. Ekde la origino, dank' al impulso de la monaĥoj de la abatejo de *Beauport* kiuj zorgis pri ĝi, la kapelo iĝis grava pilgrimejo. Pro tio, plivastiĝo de la kapelo baldaŭ necesis.

- La dua (15-a jarcento): oni pligrandigis la navon per la tri lastaj spanoj, la senjora kapelo (dekstra transepto) kaj la porĉo.

- La tria (18-a jarcento): oni aldonis la ĥorejon kaj la okangulan sonorilturon.

Starante piede de la simpla kalvario, ni malkovras la kapelon.

### La porĉo

La tre eleganta porĉo malfermiĝas tra ogiva pordo ornamita per kolonoj. Ambaŭflanke, du niĉoj entenis la statuojn de Sankta Petro kaj Sankta Paŭlo. Formanĝitaj de la tempo, ili estas nun ŝirmitaj en la ĥorejo.

Super la porĉo staras malgranda konstruaĵo kiu utilis kiel sekretariejo kaj aŭskultejo. Tie, post la dimanĉa servo, protektita de ŝton-punta balustrado, la seneskaldo de la jurisdikcio juĝadis la akuzantojn kaj la akuzatojn starantajn piede de la kruco sur la preĝeja placo.

Interne de la porĉo, la 12 apostoloj kun siaj atributoj bonvenigas nin. Ekde 1907 unu niĉo estas senhava: ŝtelisto vagis tie kaj forprenis la statuon de Sankta Luko. La pordo estas superita per polikromia ligna statuo de la Virgulino kaj de pentritaj volboj.

### Interno de la kapelo

Enirinte la kapelon, ni staras en la plej malnova parto de la konstruaĵo. Rigardante la ĥorejon, ni bone distingas la tri etapojn de la konstruado.

La pilastroj de la arkoj de la 13-a jarcento estas masivaj kaj dikaj, sen ornamaĵo.

La pilastroj de la tri lastaj spanoj (15-a jarcento), kiuj sekvas, estas okangulaj kaj sveltaj. Fronte al la ĥorejo estas klappordo kiu ebligis eniri la subteran tunelon ligantan la kapelon al la kastelo "la *Noë Verte*" je 5 km de ĉi tie.

Diversaj statuoj ornamas la navon. Granda krucifikso (15-a jarcento), Nia Damo de Bona Sekurigado,

Sankta Johano, kaj Sankta *Maŭdez*. En alia stilo: sidanta Virgulino, piedvestita per lignaj ŝuoj, proponas sian mamon al Jesuo kiu rifuzas. La navo havas ŝip-renversitan volbon el ligno kaj skulptitajn trabojn ĉe la ekstremaĵoj.

En la kapelo estas sepultejoj lokitaj sub la slabaro. La plej bela, tiu de Senjoro *de Lizandre*, estis frakasita dum la franca revolucio (1789).

### La mortodanco

*Kermaria* estis, kiel multaj aliaj kapeloj en Bretonio, vera nekropolo. Pro tio, ni ne miros malkovri ĉi tie rarajn pentraĵojn dediĉitajn al la morto-mistero: mortodanco kiu estis realigita inter la jaroj 1483 kaj 1501. Kalkoŝmirita dum la 18-a jarcento, ĝi estis malkovrita meze de la 19-a jarcento de unu el la posteuloj de la senjoraj posedantoj de *Kermaria* en la 16-a jarcento. Ĝi inspiriĝis de la mortodanco pentrita en Parizo en 1425 sub la arkadoj de la klostro de la "Amastombejo de la Senkulpuloj".

La 47 figuroj, man-en-mane, elvokas vivantajn, ĉiu-aĝajn kaj ĉiu-sociklasajn personojn disigitajn per senkarnaj kadavroj kiuj ritmas la farandolon. La danco komenciĝas sur la suda flanko kaj finiĝas sur la norda. La personoj altaj je 1,30 metro aperas laŭ la malkreskanta soci-ordo.

La Aktoro, kiu redaktas la sentencojn skribitajn sub ĉiu figuro, tradicie kondukas la sarabandon, sed lia bildo malaperis same kiel tiu de la Papo kaj de la Imperiestro. Videblas nur, sur la suda flanko: la Kardinalo, la Reĝo, la Patriarko, la Konestablo, la Ĉefepiskopo, la Kavaliro kaj la Episkopo.

Sur la funda flanko, mankas la Eskviro, la Abato, la Prefekto kaj la Astrologo normale lokitaj ĉiuflanke de la vitralo.

Nordaflanke, la danco rekomenciĝas per la Burĝo, la Kartuziano, la Serĝento. Poste sekvas kvar personoj ne disigitaj per skeletoj: la Kuracisto kun botelo da medikamentoj, la Uzuristo kaj inter ili la Virino kiu alkroĉiĝas al siaj du najbaroj; sekvas la Almozulo.

La alternado kun kadavroj reaperas poste: la Amoranto en strikta jako, la Menestrello kun sakfluto, la Kampulo kun serpo kaj plugpioĉo, kaj fine la Franciskano (la bildo de la Infano ne plu videblas).

Kelkaj spuroj de la sentencoj ankoraŭ videblas sub la Reĝo, la Patriarko kaj la Konestablo.

Estas ankoraŭ aliaj pentraĵoj en la kapelo: la profetoj (Davido, Jesaja, Zeĥarja, Elija) kaj "la tri mortintoj kaj la tri vivantoj". Pro tiu ensemblo de pentraĵoj, *Kermaria* estis sendube, dum la 15-a jarcento, unu el la plej belaj religiaj konstruaĵoj.

**La ĥorejo** (18-a jarcento) pligrandigas la navon, kaj dank' al kvin vitraj aperturoj ĝin tre bone lumigas. Apogita kontraŭ la dekstra muro, oni miras pri vestiĝo - ŝtuparo kiu kondukis al dormoĉambro je dispono de la pilgrimantoj survoje al Santiago de Kompostelo. Sube de ĝi, ŝtona lavabo ebligis refreŝiĝi.

Ni retrovas la statuojn de Sankta Petro, Sankta Paŭlo kaj (el granito) Sankta Mikaelo faligante la drakon.

Ni rimarkas belan lignan ĥorpupitron kaj kuriozan kraniŝkatolon, kun la surskribo "*Le Ceff de Lezobré*", entenanta, laŭ la popola legendo, la kranion de Senjoro de

*Lizandre*. Kvin retabloj el alabastro kompletigas la ornam-arton de la ĥorejo.

**La senjora kapelo** de la suda transepto (15-a jarcento) estas lumigata per du grandaj fenestroj. Sur la muroj, sidanta Virgulino tenante sceptron estas sendube la plej malnova bildo de Maria kultadita en *Kermaria*. Sekvas multaj aliaj statuoj: Barba, Katarina, Berta, Elegio, *Fiacre*, Nikodemo, Dominiko...


### La sanktejo en danĝero

La franca revolucio de 1789 kiu atakis tiom da religiaj monumentoj ne ŝparis la kapelon *Kermaria*. Sed meze de la 19-a jarcento alia neatendita danĝero minacis la kapelon. La parokestro de *Plouha* volis detrui la kapelon por konstrui sian propran preĝejon. Kiam alvenis la detruistoj, la *Kermaria*-kampanoj bonvenigis ilin armitaj per forkoj, falĉiloj kaj bastonoj!

### Legendo pri Senjoro de Lizandre

Dum la tiel nomata "Ligo" (1588), Senjoro *de Lizandre* defendis Parizon kontraŭ la armeoj de Henriko de Navaro. Je la sieĝo-fino, dubante pri la pardonemo de la nova reĝo, li refantaziis la ruzaĵon de la soldatoj de Trojo. Li mortigis sian ĉevalon kaj forigis ĝian intestaron. Poste, oni enkudris lin vivantan ene de la besto. Tiele li sukcesis fuĝi antaŭ la armeoj de Henriko la Kvara.

Se la ŝtonoj povus paroli, ili rakontus la epopeon de la unuaj konstruistoj, la fieron de la artistoj kiuj kontribuis al la beleco de



*Kermaria*, sed ankaŭ la vundo-spurojn de la Funebro, de la Revolucio, de la Tempo. Ili ankaŭ kapablas kanti la ĝojon de la feliĉaj eventoj: la baptoj, la edziĝoj, la foiroj kiuj ĉirkaŭe okazis.

Tiu bela kapelo, kiu preskaŭ malaperis, nun renaskiĝas: ĝi estas parto de nia hereda bretona posedaĵo, sed ankaŭ ĝi estas sanktejo kie ĉiujare okazas religiaj manifestacioj (*les pardons*).

Dum la Pluezekaj Esperanto-Renkontiĝoj ni ofertas al vi la eblecon malkovri la kapelon *Kermaria*, okaze de nia turisma programo.

La 5-a numero de nia bulteno permesis al ni malkovri la Dresdenan Mortodancon: ni konstatas ke la Morto estas internacia temo. Ĉu aliloke ekzistas ankaŭ similaj mortodancoj?

Jeanne

(Plouézec/Ploueg-ar-Mor -Bretonio)

### Fontoj: INTRON VARIA AN ISKUIT - PLOUHA

Jean Cocaign

(ancien curé doyen de Plouha)

Maurice Ménard

(maître en archéologie chrétienne)

Ofte la religioj dividis la homojn anstataŭ kunligi ilin, ĉar la homoj ne estas sufiĉe modestaj por konsenti ke se kelkfoje ili atingis parton de la Vero ili ne posedas la tutan Veron. Interŝanĝoj estus bonaj kun homoj kiuj atingis aliajn verpartojn. Transe de la dogmoj estas la bezono kompreni la signifon de nia ekzisto: De kie ni venas? Kial ni estas nun sur tiu ĉi planedo? Kion ni devas fari? Ĉiuj homoj iam tion demandas.

Dum mia infaneco mi ricevis katolikan edukadon kiu ege traŭmatizis min pro la timego peki: kiam oni pekas, „infero atendas nin, infero kun la plej teruraj suferoj en fajrego. Eternaj suferoj” - almenaŭ surtere la suferoj ne estas eternaj! Nun verŝajne la katolikoj ne plu insistas pri la infero sed prefere pri la dia Amo, pri la Amo inter la homoj.

Feliĉe en la jaro 1931 mi eniris en laikan gimnazion kie ne plu temis pri religio. Mi vivis trankvile nur pensante pri miaj studoj kiujn mi ŝatis. En 1937 dum la „filozofia jaro” mi serĉis la Veron en filozofioj: *Bergson, W. James, Kant*, sen konkludo. Almenaŭ mi malkovris ke ĉiuj homoj devus vivi kiel fratoj. Mi malkovris ke mi estas pacifista mondĉivitanino. Sed okazis la dua mondmilito. En 1945 mia ĉefa malkovro estis ESPERANTO, kiu kondukis min al la internacia Civila Servo por Paco. Mi laboris en diversaj lokoj, unue en Francio, poste en Nederlando, en Germanio. Tie mi amikiĝis kun aliaj junaj bonvoluloj. Kelkaj estis kvakeroj.

Mi demandis: Kio estas tio? Tiam mi eksciis ke ekzistas religio el


kristana deveno, sen preĝejoj, sen pastroj, sen dogmoj, sed kun silenta meditado kiu diras ke dia fajrero estas en ĉiu homo kaj ne nur en ĉiu kristano. Mi eksciis la belan historion de la kvakeroj, ilian migradon de Britio al Ameriko kun *William Penn* (1644-1718) kiu amikiĝis kun la lokaj amerikaj loĝantoj, erare nomitaj Indianoj. *W. Penn* provis krei idealan societeton kun egaleco inter ĉiuj viroj kaj virinoj en la ŝtato kiu nun nomiĝas *PENNSylvania*. La franca verkisto *Voltaire* (1694-1778) kiu ne estis tre religiema admiris tiujn kvakerojn: pri tio li verkis. Do mi estis kontenta koni la kvakerojn kaj mi restis simpatiuino eĉ kiam poste mi malkovris alian movadon kiu instruis al mi la gravecon de la penso kreanta.

Poste mi eksciis ke en malgranda vilaĝo de suda Francio, *Congénies* (okcitane *Congènas*), 20 kilometrojn sudokcidente de la urbo Nimo, homoj kiuj estis lacaj pri religiaj bataloj inter katolikoj kaj protestantoj decidis kunveni silente paceme ekster preĝejoj. Sen koni la kvakerojn tiuj homoj vivis same. Kiam ili ekkonis la ekziston de la britaj kvakeroj, ili aliĝis – tio okazis en la jaro 1788. En *Congénies* renaskiĝis kvakera Centro en la jaro 2003. Antaŭ du jaroj mi vizitis ĝin kaj eĉ instruis Esperanton al kelkaj volontuloj dum unu semajno. Nun per interreto mi ricevas mesaĝojn en Esperanto de kvakeroj el Germanio, Aŭstrio, Usono, Norvegio, Svislando. La fama esperantisto *Edmond Privat* (1889-1962) estis kvakero. La kvakeroj ne estas bone konataj almenaŭ en Francio, kvankam ili ricevis Nobelpremion en 1947 pro sia helpo dum la dua mondmilito.

Mi konas francojn kiuj estis helpitaj, ankaŭ germanan amikon kiu ricevis manĝaĵojn en sia lernejo kiam li malsatis post la milito. Nun la kvakeroj helpas en Palestino, Israelo, kunigante homojn el la du landoj. Same ili faris en Irlando. Kelkaj estas survoje al Hinda Unio por partopreni en la marŝado de kamparanoj sen tero.

*Gaby Treanton* (Bretonio)

## Ikono de la Panaghia Paramythia



La ikono de la *Panaghia Paramythia* troviĝas en la monakejo *Vatopaedi* sur la Monto *Athos* en norda Grekio.

Ĝi estas mur-pentraĵo el la 14-a jarcento, kiu origine estis en ekstera nartekso, vidalvide al la kapelo je Sankta Nikolao. Poste ĝi estis metita en sanktaĵ-kadron en kapelo kun la sama nomo. Pli frue ekzistis la tradicio, ke la monakoj, kiuj forlasas la „*katolikon*”, kisas la ikonon kaj ke la abato deponas la ŝlosilon ĉe la pordisto.

Laŭ la tradicio, okazis iun tagon, ankoraŭ dum la Bizanca epoko, ke la abato, kiu volis transdoni la ŝlosilon al la pordisto, ekaŭdis jenajn vortojn de la ikono:

„Ne malfermu hodiaŭ la pordegojn de la monakejo, supreniru sur la remparojn kaj forpelu la piratojn». La voĉo ripetis tiujn vortojn. Kiam li sin turnis por rigardi al la ikono, li ekvidis, ke la sankta infano metas sian manon sur la buŝon de la patrino kaj aŭdis ĝin diri jenon: «Ne, patrino, lasu ke ili estu punataj tiel kiel ili meritas». La beata virgulino tamen forprenis la manon de Kristo, iomete movis la kapon kaj ripetis siajn vortojn.

La monakoj rapidis sur la remparojn, ekvidis la piratojn, kiuj intertempe vere encirklis la monakejon atendante malfermon de la pordegoj por ke ili povu invadi kaj prirabi la monakejon.

La mirakla interveno de la virgulino savis la monakejon sed de tiam la ikono konservis – kiel plia miraklo – la man-moviĝojn de siaj figuroj. Ekde tiam la monakoj zorgas pri eterna lumo antaŭ la ikono, celebras la vendredan liturgion je ĝia honoro kaj preĝas ĉiutage specialan litanion. Dum kelka tempo ekzistis ankaŭ la tradicio, ke la monakoj estas tonsurataj en tiu ĉi kapelo.

*Benoît Philippe* (Dresden - Saksio)





Pregejo de la Paco en Świdnica